

BIBLIOGRAFIO

1. F. Tabio y E. del Rey, Pre Historia de Cuba, Academia de Ciencias de Cuba, La Habana, 1966.
2. Francisco Pérez de la Riva, La Agricultura Indoantillana, Antropologia n-ro 17, La Habana, 1951.
3. Instituto de Lingüística y Literatura de la Academia de Ciencias de Cuba, Anuario n-ro 5, La Habana, 1974.
4. Histoire Naturelle et Morelle des Isles Antilles de L'Amérique avec une vocabulaire Caraïbe, Rotterdam, MDCLVIII, aŭtoro nekonata.
5. Alfredo Zayas y Alfonso, Lexicografía Antillana, La Habana, 1914, (Diccionario de voces usadas por los aborígenes de las Antillas Mayores y de algunas de las Menores y algunas consideraciones acerca de su significado y formación).
6. Dirección Política de las FAR, Historia de Cuba, Segunda Edición, La Habana, abril de 1968.
7. Diversaj ekzempleroj de la Analoj de la Kuba Historia Akademio (Academia Cubana de Historia).

Adreso de la aŭtoro:

Besada Toledo, Juan Lazaro
 Gervasio n-ro 62 Apto. 3, 2do piso
 e/ Lagunas y S. Lazaro
 C 10200 Cdad Habana
 CUBA

La Bibliofilio

Kazimierz Szczurek

1. Enkonduko

En la greka lingvo *biblio* signifa "la libro", kaj *phileo* – "mi amas". El tiuj du vortoj oni kreis novan terminon *bibliofilio*, kies tasko estas nomi specifan rilaton de homo al la libroj, plenan da ŝato kaj pietismo. *Bibliofilo*, libroamiko, konas librojn, ŝirmas kaj kolektas ilin, ĉar li sentas internan bezonon fari tion. ĉiu nova akiraĵo ĝojigas lin, kaj la jam posedataj libroj estas fonto de konstantaj plezuro kaj kontento. Libro obsedas lin, li okupiĝas pri ili, sed tio ne kaŭzas ke li perdas sian prudenton. Bibliofilo, diference ol bibliomano, ne estas strangulo al kiu libroj difektis la menson, sed saĝa, prudenta amiko de valoraj verkoj. Valoraj laŭ diversaj vidpunktoj.

2. Antikvaj tempoj

Bibliofilio en tia ĉi senco estas tiom aĝa kiom la libro mem, la libro kompreneble en ĉiuj siaj formoj. Jam en la plej antikva tempo la libro, konsistante el argilaj tabuletoj, trovis siajn favorantojn kaj kolektantojn. Ĝis nun estas viva la nomo de Asurbanipalo, asira reĝo el la jaroj 669 – 626 a.K., homo klera kiu en sia granda biblioteko kolektis abundan materialon pri la antikva historio. Kiam en la 1853-a jaro anglaj arĥeologoj retrovis lian bibliotekon kaj esploris la trovitan materialon, ili konstatis, ke la argilo de la reĝaj tabuletoj estas pli bona kaj la skribo pli bela kaj preciza. Tio sekvis verŝajne el zorgado de la reĝo mem, kiu okupigis ĉe sia kortego aron da spertaj kaligrafoj kaj atentis, ke la skribataj verkoj havu formon indan je reĝo.

Alia eminentulo de la antikva bibliofilio estis Aristotelo. Tiu genia filozofo dum sia tuta vivo kolektadis verkojn pri ĉiu sciencofako kaj studis ilin profunde. Libroj – en ilia rulaĵa formo memkomprene – estis lia mondo, kaj la studado fonto de nobla ĝuo. La persista laboro kaŭzis ke li ekposedis polihistorie la tutan scion de sia epoko. Post morto de Aristotelo lia valora libraro (krom la originalaj manuskriptoj) pere de Teofrasto kaj Neleuso fariĝis posedaĵo de la Aleksandria Biblioteko.

En Romio riĉaj civitanoj, emantaj brili antaŭ la popolo per siaj havaĵoj kaj pompo, okupigis multajn sklavojn por ke tiuj kopiadu diversajn tekstojn, precipe verkojn de famaj poetoj kaj historiistoj. La kutimo posedi hejme libraron, komence propra al filozofoj, verkistoj k.s., pli poste fariĝis ĝenerala modo, precipe dum la imperiestra tempo, kaj preskaŭ ĉiu almenaŭ iome elstara /aŭ opinianta sin tia/ civitano nepre posedis bibliotekon kies volumojn fojfoje li ne konis ĉar ne legis. Sed ankaŭ en la antikva Romio estis veraj amikoj de la libro. Apartenis al ili, ekz. C.A. Pollio, militisto kaj politikisto kiu post retiriĝo el la politika vivo fariĝis mecenato de scienco kaj kulturo. Mem historiisto kaj poeto, li ĉirkaŭis sin per poetoj, filozofoj kaj sciencistoj, kiujn li protektis. Pollio fondis en Romo la unuan publikan bibliotekon, realigante per tio ideon de Julio Cezaro kiu delonge planis aranĝi ion similan al la Aleksandria Biblioteko, sed ne sukcesis realigi tiun ideon dum sia vivo.

Korifeoj de la romiaj bibliofiloj estis ankaŭ M.T. Cicerono – fama retoro kaj historiisto; Teofrasto, kromnomata Tiraniono – filologo, pasia kolektanto de manuskriptoj; plue Persio – satiristo; Martialo – aŭtoro de dornaj epigramoj; Atiko – verkisto, historiisto kaj samtepe granda financisto. Tamen dum lastaj jarcentoj de la malnova epoko la romia bibliofilio iom post iom degeneris akceptante ecojn de snobismo.

3. Mezepoko

La mezepoko ne alportis ŝanĝon. Libroj troviĝis precipe en monaĥejoj, privataj bibliotekoj estis maloftaj, same la kontaktoj de sciencistoj; la

libromerkato malviglis. Ĉio kvazaŭ dormetis atendante novan disfloron. Sed eĉ en tiu mezepoka stagno ie–tie troveblis pursangaj bibliofiloj.

Inter la jaroj 560–636 vivis en Hispanio Isidorus Hispalensis – pastro, ekde la 600–a jaro episkopo en Sevilla, patro kaj doktoro de l'eklezio, unu el la plej instruitaj scienculoj de la mezepoko. Li skribis kelkajn disertaĵojn teologiajn kaj historiajn, i.a. enciklopedion *Originum sive Etymologiarum libri XX*.

Isidorus, obeante sian pasion por libroj, elspezis por ili parton de sia mono kaj kolektis rare valoran privatan bibliotekon, unu el la plej elstaraj en tiu epoko. La volumoj okupis dek kvin ŝrankojn kaj estis precize ordigitaj je verkoj teologiaj, historiaj, juraj k.t.p. En tiuj libroj troviĝantaj en ejoj ornamitaj laŭ la antikva romia stilo per bildoj kaj bustoj, la episkopo volonte serĉis nutraĵon por sia sciavida menso.

Pasia bibliofilo oni opinias la anglan episkopon Riĥardon de Bury. Naskiĝinta en 1287 en la angla graflando Suffolk, filo de normanda kavaliro, Riĥardo ricevis sian nomon de Bury (lia vera nomo estis Aungervyle) laŭ la familia kastela sidejo Bury Saint Edmont. Instruisto de la reĝo Edvardo III kaj ties favorato, Riĥardo okupis altajn postenojn, interalie de episkopo de Durham kaj de la reĝa kanceliero, kaj li multe klopodis mildigi la militajn emojn de sia monarĥo kaj konservi pacon. Jam dum sia junaĝo li infektiĝis per "bacilo de bibliofilio" kaj laŭ fluo de jaroj tiu pasio plifortiĝis. Pro ekleziaj kaj politikaj kaŭzoj multe vojaĝante tra Eŭrope, li ofte trovadis okazojn por kontentigi sian avidon je libroj. Kiel episkopon kaj politikan eminentulon, oni akceptadis lin solene kaj – konante lian ŝaton – klopodis gajni lian favoron per donacado de libroj. "Oni sciis", li skribis mem, "ke mi pli alte taksas valoran volumon ol monon, tial difekteblaj foliantoj kaj malnovaj kvartoj migris al mi /...../ anstataŭ kutimaj impostoj kaj novjaraj donaĵoj."

De Bury per eĉetitaj kaj ricevataj libroj senĉese pligrandigadis sian bibliotekon ĝis ĝi fariĝis siaspeca mirindaĵo. Bedaŭrinde, la sorto de tiuj libroj ne estis feliĉa. Li testamentis ilin al Durham–Kolegio en Oksfordo, kie li iam studis, sed laŭdire post kiam Henriko VIII en la deksesa jarcento

likvidis tiun lernejon la libroj dissemiĝis diversloken. Parto venis en la librejon de la duko Humprey, parto en la bibliotekon de Palliot—Kolegio, parton akiris la reĝa kuracisto Owen de Godstow. Ni tamen menciuj, ke ne ĉiuj historiistoj opinias tion vera. Kelkaj supozas ke la libroj neniam atingis Durham—Kolegion sed estis disvenditaj por pagi la ŝuldojn de la episkopo.

Rihardo de Bury vivis dum la tempo kiam en Anglio montriĝis ankoraŭ neniuj signoj de la renesanco, sed malgraŭ tio, li mem kaj liaj ideoj parte parencis strange al la humanistoj kaj ilia ideologio. Li pli estis diplomato—politikisto ol episkopo—animpaŝtisto. Klera kaj instruita, li admiris librojn kaj malbenis ties detruantojn. Nelonge antaŭ sia morto li skribis verkon, kiu certigis por li daŭran, honoran lokon inter la plej eminentaj bibliofiloj de la tuta mondo. Tiu verko *Pri amo al la libroj seŭ Philobiblon* aperinta unuafoje en 1473 kaj poste tradukita en diversajn lingvojn kaj reeldonata senĉese ĝis hodiaŭ, estas opiniata la plej malnova lernolibro de la bibliofilio, kaj la aŭtoro mem klasikulo inter la bibliofiloj de ĉiuj temoj.

La lingvo de tiu verko tie—ie estas tre raspa, epitetoj kaj kondamnaĵoj eĉ drastaj, sed oni povas kompreni kaj senkulpigi la aŭtoron pripensinte la situacion en tiamaj degenerantaj monaĥejoj. Krom kartuzianoj kaj parte benediktanoj, tiutempaj ordenoj ne montris pietismon je scio, libroj kaj kaligrafia manskribado. Ne mirinde do, ke la klera bibliofilo trovis multajn kaŭzojn por indigniĝi.

"Tutcerte", li skribis, "la libroj meritas esti traktataj kun konvena estimo flanke de pastroj, sed tiuj profanas ilin fie, kuraĝante tuŝadi ilin per malpuraj manoj. Ni do opinias averti ĝuste la lernantojn pri diversaj neglektaj agoj, kiujn ili ĉiam povas eviti kaj kiuj tre nocas al la libroj. Ĉu vi eble vidis tian facilaniman senzorgulaĉon, kiel li, stultulo, kondutas dum legado, kiel vintre dum frosto li sidas kun kataranta kaj gutanta nazo kaj eĉ ne ekpensas viŝi ĝin, por ke li ne makulu per abomena muko la libron kuŝantan antaŭ li! Kial ja, je dio, oni ne donis al li antaŭtukon kaj viŝĉifonon anstataŭ libron! Liaj ungoj abundas je fetoranta malpuraĵo, nigra kiel fulgo, kaj per ili li signas la plaĉajn ĉapitrojn de la libro. Li metas inter

diversajn foliojn sennobran aron da pajleroj, elstarantaj eksteren, por ke tia pajlosako memorigu al li tion, kion lia memoro ne kapablas konservi. Kaj ĉar la libroj ne havas stomakon, kiu digestus tiun pajlon, ĝi elpuŝas la librotrunkon el la bindaĵo, por fine putri forgesita. Tia fetorulo ne hontas manĝi fruktojn kaj fromaĝon super apertita libro, aŭ li igas tason promeni jen tra la dekstra, jen tra la maldekstra paĝo kaj, ne havante apude sian almozulan sakon, lasas en la libro restaĵojn de la tagmanĝo. Li parolaĉas sen paŭzo, per tiu senĉesa bojado rabas tempon de siaj kolegoj regalante ilin per amaso da tute sensecaj frazoj, kaj per salivo priŝprucas la malfermitan libron apogitan surgenu. Ba! Fervore gestikulante li apogas sin je la libro kaj post breva sindelektado per la scio li ekdormetas, kaj poste vekigante kaj movante la brovojn ĉifas la marĝenojn ne sen damaĝo por la libro" (fgm. de la 17—a ĉapitro).

La mezepoko, kiel jam dirite, estis por la bibliofilio tempo de stagno, ĉi tiu aserto tamen ne rilatas la araban mondon. Tie baldaŭ post establo de islamo oni ekkolektis librojn grandskale. La kortegoj de Abasidoj en Bagdado, de Fatimidoj en Kairo, de Omajadoj en Kordobo donis ekzemplojn al la plej altaj tavoloj, kiujn laŭvice imitis la ceteraj.

Pli kaj pli ofta aferaĵo fariĝis Dar al Hikma, Domo de Saĝo — institucio simila al niaj sciencaj institutoj, posedanta bibliotekon, tradukejon, astronomian abservejon. Sciencistoj trovis tie idealajn kondiĉojn por sia laboro, por interŝanĝo de spertoj kaj ideoj.

Al fondintoj de tiaj "saĝejoj" apartenas interalie la kalifo al Hakim bi Amr Allah. En 1005 li konstruigis en Kairo domegon kaj asignis grandan sumon por fari ĝin scienca laborejo. Oni transportis tien grandan parton de la biblioteko de Fatimidoj, aĉetadis novajn librojn, kopiis kaj bindis. La bela biblioteko, laŭdire havante kelkcent mil verkojn, servis al ĉiuj. La kalifo kolektis en ĝi multajn aŭtorajn manuskriptojn, kiajn posedis neniu monarĥo, li tamen ne gardis ilin avide sed disponigis al bezonintoj

Granda bibliofilo estis ankaŭ en la X—a jc. la kalifo al Hakam en Kordobo. La bibliotekon enhavantan kvarcent mil verkojn li senĉese kreskigis per aĉetoj. Li mem estis eminenta konanto de la araba literaturo, legis

multajn ĝiajn librojn kaj notis en ili rimarkojn pri la verko mem kaj pri ties aŭtoro. La senditoj de la kalifo migris tra la arabaj landoj, serĉis kaj aĉetadis por li valorajn librojn, ne hezitante pagi eĉ grandajn sumojn, ja la kalifo ne avaris.

Sed, kiel ni menciis, librojn kolektadis ne nur monarĥoj. Ilian ekzemplon sekvis korteganoj, veziroj, emiroj, altrangaj oficistoj, kaj fojfoje eĉ simplaj homoj.

En Rajo la veziro Ibn Abba (X-a jc.) posedis bibliotekon kies teologia parto egalas al kvarcent ŝarĝaĵoj portataj de kameloj. Nur la katalogo de tiuj libroj konsistis el dek volumoj.

En Kordobo la kadio Ibn Fatis konstruigis monumentan domon por sia biblioteko. La interno — muroj, plafonoj, tapiŝoj, kusenoj — estis verdaj, la libraron gardis kustodo Muhamad Ibn Isa Abi Kadir al Hadrami, konata verkisto, kaj ses salaĵrataj kopiistoj senĉese kopiis valorajn verkojn. Ibn Fatis ne hezitis elspezi grandajn sumojn por akiri deziratan verkon, fojfoje eĉ multe tropagante la veran valoron de la libro. Se la posedanto rifuzis vendi, la kadio klopodis kopii la verkon en sia kopejo kaj poste redoni. Plimulton de sia grande riĉaĵo li elspezis por la libroj. Bedaŭrinde, tiu mirinda libraro estis disvendita en aŭkcio, kiun aranĝis heredintoj de Ibn Fatis.

En la sama urbo vivis malriĉa instruisto Muhamad ibn Huzma. Nemulta estis la mono gajnata per instruado de infanoj, simplaj do la vestaĵoj kaj manĝaĵoj de la instruisto, sed malgraŭ tio li konstante elspezadis parton de sia salaĵro, por aĉeti librojn. ĉar ili, kiel mane skribitaj, estis multekostaj, la tutan liberan tempon li foruzadis por kopii manuskriptojn. Tiamaniere lia biblioteko, enhavanta multajn valoraĵojn kaj bone, zorgeme aranĝita, senĉese kreskadis ĝis ĝi fine inter kordobaj verkistoj kaj sciencistoj fariĝis konata kaj enviata. La instruisto ne hezitis entrepreni lacigajn, longajn vojaĝojn orienten, se li elmenaŭ iomete esperis akiri tie valoran manuskripton aŭ fari por si kopion.

Tian amon al libroj oni povas trovi en diversaj jarcentoj kaj diversaj epokoj.

4. Renesanco

En Eŭropo tamen la tempo dum kiu naskiĝis la bibliofilio en novepoka senco, bibliofilio kiel movado interliganta kolektantojn, kaŭzanta longajn vojaĝojn por serĉi, aĉeti, eĉ ellogi librojn, studi ilin kaj aranĝi bibliotekojn, estis la renesanco. Jam en la dekkvara jarcento komenciĝis tiu vibra ĉasado je malnovaj libroj, daŭranta ĉircaŭ du jarcentojn.

"Dum la koncilio en Konstanco", skribis K. Moravski, "la partoprenantoj entreprenis grandajn ekskursojn sciencajn al la monaĥejoj en Reichenau kaj St. Gallen, penetris malmulte konatajn bibliotekojn, el kiuj emergis en la helan lumon manuskriptoj de multaj antikvaj verkistoj, ne konataj aŭ forgesitaj dum multaj jarcentoj /...../ En Konstancon oni transportis tiujn manuskriptojn kaj la kunvenintaj amatoroj de antikvaĵoj akceptis ĉiun novan akiraĵon per nova admiro kaj novaj simptomoj de ĝojo /...../ La koncilianoj revenantaj el Konstanco kunportis en siaj vojaĝsakoj fojfoje ne nur unu verkon."

Unu el la fokuso de la renesanca bibliofilio fariĝis Florenco, kaj precipa merito tiurilate apartenas al la familio Medici. Fundamenton de la famo kaj gloro kreis Kosimo la Pli Aĝa, fondinto de Florenca Akademio kaj de Medici-Biblioteko; pluajn kontribuadojn donis la sekvintaj anoj de la familio, precipe Laŭrentio la Pompa. Ili dissendadis multajn konfidatojn kies tasko estis serĉi librojn, akiradi ilin ĉiel kaj alporti aŭ sendi en Florencon, kie en servo de Medici laboris multaj filologoj kaj kopiistoj.

Elstare montriĝis, ekzemple, Niccolo dei Niccoli — pasia bibliofilo, kiu pro aĉetado de libroj enŝuldiĝis ĉe Medici kaj eklaboris por li, kaj Poggio Bracciolini, eminenta filologo, dum multaj jaroj vojaĝinta tra Italio, vizitinta ankaŭ Anglion, Francion kaj Germanion; li trovis verkojn *De institutione oratoria* de Kvintiliano, *De rerum natura* de Lukretio, dek nekonatajn paroladojn de Cicerono kaj multajn aliajn. Eneasio Silvio Piccolomini, la postea papo Pio II, retrovis *Historion de Gotoj* de Jornandes, kaj *Kronikon* de Otto Freisingen, kaj Jahano Laskaris el sia serĉa vojaĝo revenis kun ducent grekaj manuskriptoj, inter ili multaj ne konataj.

En Italio ne nur unuopuloj sed eĉ ekspedicioj veturis al Greklando kaj Malgranda Azio por penetri tieajn bizancajn monaĥejojn, kies bibliotekoj abundis je grekaj manuskriptoj. Helpis bizancaj scienculoj kiuj, precipe post falo de Konstantinopolo, forfuĝis de la persekutado, venis Italion kaj kiel spertuloj fariĝis gvidantoj tra la greka literaturo. La renesanco estis tempo dum kiu kreskis en Italio kaj poste en preskaŭ tuta Eŭropo grandaj libroroj.

Komence de aprilo 1341 okazis en Romo rara festo: akompanate de bruanta kaj viva homamaso kaj sonado de trumpetoj reprezentanto de la senato dekoris la eminentan poeton Francisko Petrarca per laŭra krono. La poeta famo akompanis Petrarca dum lia tuta vivo kaj daŭras plu, kvankam post lia morto pasis multaj jarcentoj, sed ne ĉiuj liaj admirantoj scias, ke la granda poeto estis ankaŭ arda amiko de libroj kaj ke oni eknomis lin eĉ patro de la novepoka bibliofilo kaj lian kolekton la unua moderna biblioteko.

Jam en sia junaĝo Petrarca fariĝis pasia esploranto kaj kolektanto de libroj, kion faciligis lia vigla vivo. Li ofte ŝanĝadis la loĝlokon kaj tre multe vojaĝis. Pro politikaj kaŭzoj liaj gepatroj devis forlasi Italion kaj ekloĝi en Avinjono, poste en Carpentras. Francisko finis tie elementan lernejon, poste kontinuigis la studadon en Montpellier kaj Bolonjo. Sed ankaŭ lia postea vivo abundis je novaj translokiĝoj kaj vojaĝoj. Tiamaniere li sukcesis traveturi Italion, Francion, Flandrion kaj la ĉerejnan Germanion, memorante ĉie profiti la okazon por ekkoni landon, homojn, ties kutimojn, historion kaj kulturon, kaj precipe serĉante kaj ĉasante valorajn librojn. Li domaĝis nek penon nek monon por kolektadi la plej eminentajn verkojn de la romia literaturo kaj serĉis tiujn verkojn en diversaj bibliotekoj monaĥeja, katedralaj, scienculaj kaj princaj. Dank al tiuj klopodoj li trovis ekz. du ne konatajn retoraĵojn de Cicerono kaj liajn leterojn *Ad Atticum*. Kion li ne sukcesis ricevi aŭ aĉeti, tion li kopiis, kaj lian precipan favoron gajnis romiaj klasikuloj el la "oro epoko" de Aŭgusto. Iliajn verkojn li klopodis senigi je ĉiuj eraraj kaj misaĵoj enkondukitaj far diversaj kopiistoj. Tiamaniere dum multaj jaroj Petrarca kolektis belegan libroron, al kiu li rilatis tiel amike kaj pietisme, kvazaŭ ĝi estus viva, amata estaĵo. Montras tion plej klare liaj propraj vortoj:

"Mi havas amikojn kies kompanion mi tre alte taksas. Ili devenas el ĉiuj landoj kaj tempoj kaj ilia sciabundo ŝargis ilin per gloro. Sed malgraŭ tio estas tre facile rilati kun tiuj amikoj, ĉar ili ĉiam pretas servi al mi, ĉiam emas respondi demandojn kiujn mi diras al ili. Unuj rakontas pri okazintaĵoj el pasintaj tagoj, aliaj malkaŝas al mi sekretojn de la naturo. De ĉi tiuj mi lernas kiel mi vivu, de tiuj kiel mi mortu. Iuj distras mian animon per gajo kaj forigas miajn zorgojn, aliaj fortigas mian spiriton kaj instruas min pri la pleja gravaĵo: regi la dezirojn kaj stari sur propraj piedoj. Koncize, ili apertas por mi pordegojn de ĉiuj artoj kaj sciencoj, kaj mi ĉiam povas kalkuli je ilia instruo. Kaj, kiel reciprokaĵon por ĉio kion ili al mi ofertas, ili postulas nenion krom iom da spaco en iu ajn angulo de mia modesta domo."

La plej forta deziro de la granda poeto kaj bibliofilo estis ke lia biblioteko fariĝu posedaĵo de Venecio kaj servu al la popolo. Li testamentis ĝin al tiu urbo, sed bedaŭrinde la duan parton de la deziro oni neniam realigis, la valorega libroro tute dissemiĝis.

Renesanco kaj humanismo, kutimas diri historiistoj, eniris Vatikanon samtempe kun la surtronigo de Tomaso Parentucelli kiel papo Nikolao V. Klera, honesta kaj grandmensa favoranto de la scio kaj de la artoj, talenta oratoro kaj sperta diplomato, li sukcesis fari konkordaton kun la Germana Imperio, paciĝi kun la tiam baŭmanta Pollando kaj kelkaj aliaj eŭropaj ŝtatoj kaj fini la longan basilean skismon. Sed same granda estis lia merito koncerne sciencan kaj kulturan. Dank' al liaj iniciato kaj financaj rimedoj oni renovigis aŭ konstruis pli ol 40 preĝejoj, kaj li ankaŭ estas fondinto de Bibliotheca Vaticana, unu el la plej famaj kaj valoraj bibliotekoj de ĉiuj tempoj.

Parentucelli jam en la tempo, kiam li ankoraŭ na estis papo, revis esti mecenato kaj fondi bibliotekojn, kaj libroj destinataj por li devis esti ĉiel valoraj. Al li laboris multaj eminentaj skribistoj kaj miniaturistoj, kaj la florencaj librovendistoj konis lin kiel la plej fidelan, oftan klienton.

La valoroj de lia personeco kaŭzis ke dum daŭro de tri jaroj (1444–47) Parentucelli fariĝis episkopo, kardinalo kaj papo, kaj tiel trovis rimedojn por kontentigi siajn dezirojn. Per kunigo de ĉirkaŭ 350 manuskriptoj, postlasitaj far la antaŭa papo Eŭgeno IV kun la propraj. Li kreis kernon de la vatikana biblioteko. Al foraj landoj orientaj kaj nordaj vojaĝis papaj agentoj, provizitaj je mono kaj atestoj pri la papa favoro, por ĉasi tie ĉion raran kaj valoran. Ekzemplo povas esti la kvaronjara vojaĝo de Alberto Enoche, kiu trovis kompletan kopion de *Historio* de Livio. Kion ne eblis akiri, tion ili prenis prunte por kopiado doninte ateston en kiu la papo klare promesis kontentigi per kopio kaj resendi la originalaĵon al la antaŭa loko.

Precipan serĉadon kaŭzis la konkero de Konstantinopolo far tujok. La papaj konfidatoj veturis tien kaj – tre atente kaj kaŝe, ĉar ja senpermeso – "flaris" pri libroj. La rezultojn kaj signifon de tiu akirado de grekaj manuskriptoj far papaj agentoj plej bone pritaksis la elstara poeto–humanisto Francisko Filelfo, kiu diris ke malvareco kaj grandanimeco de unu sola papo Nikolao V savis kontraŭ pereco la historion kaj kulturon de la tuta antikva Greklando. Tiun kulturon la papo sincere admiris kaj ĝis la morto klopodis realigi sian tipe humanisman ideon: pere de latinaj tradukoj alproprigi al Italio la tutan grekan literaturon.

"Ni streĉu la fortojn", li skribis en letero al Granda Majstro de la Germana Ordeno, "por ke ni havu bibliotekon kun ĉiuj verkoj latinaj kaj grekaj je komuna utilo de kleraj viroj, indan je la digno de l'papo kaj ties sidejo".

Krom grekaj kaj latinaj oni baldaŭ ekserĉis ankaŭ hebreajn manuskriptojn. Al la homo, kiu estus trovinta la pratekston de la evangelio laŭ Mateo, Nikolao promesis 5000 dukatojn, sumon en tiu tempo enorman; kompreneble, neniu sukcesis ricevi ĝin. Senditoj de la papo ne hezitis aĉeti eĉ plej multekostan verkon, sed krom tio, ĉar oni konis lian pasion, en la bibliotekon migris manuskriptoj kiel donacoj, impostoj aŭ pruntaĵoj. Neniun alian papon oni omaĝis per simila kvanto da valoraj skribaĵoj.

Sed Nikolao ne kontentiĝis per nura posedo. ĉe lia kortego kolektiĝis eminentaj spertuloj kiuj, laŭ tiama kompreno de la nocio bibliofilio, esploris la tekstojn, korektis ilin kaj kompletigis. Liaj kopiistoj kaj bindistoj estis veraj majstroj, kapablaj doni al la volumoj veston indan je la granda papobibliofilo. Lin interesis libroj ĉiuspecaj, sed ĉiam ili devis esti valoraj – same laŭ la enhavo, kiel laŭ ekstera vesto. Lia okvoluma verkaro de la sankta Aŭgusteno estis tute nove por li kaligrafiita.

Tiamaniere Nikolao V sukcesis kolekti ĉirkaŭ 1200 manuskripton, la plej riĉan kolekton de tiu tempo. Nur etan nombron da ili li ne sukcesis tralegi, plejparton li profunde ekkonis. Estis por li pleja plezuro promeni inter siaj libroj, troviĝantaj en vasta ejo kun grandaj fenestroj, rigardi ilin, foliumi, legi kaj fari sur iliaj marĝenoj profundpensajn rimarkojn.

Bedaŭrinde, tiu bela frukto de multjara streĉa klopodado ne trovis justan pritakson far la sekvinta papo. Post kiam tiu ĉi, /Kaliksto III, seka juristo, eniris la bibliotekon, li diris sarkasme al sia sekvantaro:

"Nu, rigardu je kio tiu disipis la eklezian trezoron!" *Sed sunt tempora dolendi, sunt tempora gaŭdendi* (estas tempoj de suferado, estas tempoj de ĝojado): la vatikana biblioteko, jen neglektata aŭ prirabata, jen pietisme pliriĉigata kaj prizorgata, travivis jarcentojn kaj daŭre restas deponejo de plej valoraj fruktoj de la homa menso.

Tre honoran lokon en la historio de la bibliofilio okupas la hungara reĝo Matiaso Korvin reginta inter 1458–90, vere renesanca monarĥo parenca al la grandaj humanistoj, el kiuj multajn li favoris kaj helpis. Li fondis la universitaton en Pozsony, presejon en Buda kaj la faman reĝan bibliotekon Korvina, kiu laŭ probable troigita opinio de tiutempuloj enhavis 50 mil volumojn.

La reĝo, kontaktiĝanta amike kun Laŭrentio Medici, ne kontentiĝis per ia ajn skribaĵo. Li deziris posedi verkojn valorajn same laŭ la enhavo, kiel laŭ la ekstera vesto! Multaj agentoj serĉis por li librojn, simile kiel tio estis ĉe italaj princoj kaj papoj. ĉe la reĝa kortego en Buda laboris lertaj kopiistoj, ornamistoj kaj bindaĵistoj, samaj spertuloj laboris por Matiaso en Florenco.

Bona pergameno, bela, preciza skribo, altvalora bindaĵo — jen faktoroj konsistigantaj, krom la enhavo, la valoron de la Korvina-libroj. Interesa fakto estas ke ĉe tiuj volumoj por la unua fojo en Eŭropo aperis ornamaĵoj montrantaj klaran influon de la orienta bindarto.

La reĝo — klera, pensema, inklinanta al neoplatonismo — traktis librojn kiel siajn intimajn amikojn, kaj la bibliotekon li protektis kiel plej ŝatatan frukton de sia agado. Bedaŭrinde, ĝi trovis tre tristan sorton dum la turka invado en Hungarion.

5. XVIIa kaj XVIIIa jarcentoj

Al fidelaj amikoj de la libro apartenis du eminentaj francaj ŝtatistoj el la deksepa jarcento: Richelieu kaj Mazarin. La unua altnivela libronkanto sed en sia agado homo malhezitema kaj senskrupula, elspezadis grandajn sumojn por pligrandigi sian bibliotekon, sed se li ne povis akiri per aĉeto la deziratan libron aŭ manuskripton, li ne hezitis konfiski ĝin. Volante kontribui al arte altnivela eldonado de libroj, li fondis Reĝan Presejon en Parizo. Post la morto de Richelieu partan de liaj libroj ricevis la Reĝa Biblioteko, plejmulton unu el la hereduloj transdonis al la biblioteko de Sorbono.

Saman pasion je libroj, jam ekde sia juna aĝo, havis la sekvinto post Richelieu, Mazarin. Li lulis en sia menso ambician ideon organizi imponan bibliotekon kiu servus al la publiko. Lia elstara bibliotekisto G.Naudé persiste kaj fervore penetris diversajn librejojn de Eŭropo, dank' al kio la kolekto kreskis ĝis 45 mil volumoj. Kiam Mazarin falis politike, la libron oni disvendis, sed post kiam li reakiris sian postenon, li denove ekklopodis pri kolektado de libroj kaj restarigis la bibliotekon. Li eĉ vokis sian fidelan Naudé je reveno (tiu, invitive far la sveda reĝino Kristina, estis tiam reĝa bibliotekisto en Stokholmo); la maljuna bibliotekisto obeis, sed mortis dum la revena vojaĝo. La bibliotekon oni ree malfermis en 1691 kaj ekde tiam ĝi daŭre servas al la franca popolo.

Dum la tempo kiam la nobela Pollando travivadis siajn krizajn jardekojn, kiam ties najbaroj Ruslando, Prusujo kaj Aŭstrujo atendis

oportunan momenton por ekataki la malfortiĝintan ŝtaton vivis kaj agis homo, kiu en la historion de la pola kulturo enskribiĝis per oraj lilteroj: Jozefo Andreo Zaŭski. Li naskiĝis en 1701, en 1728 fariĝis ŝtata referendario, baldaŭ kanceliero de la pola reĝo Aŭgusto III, en 1759 episkopo de Kijevo. Pro kontraŭrusa opozicio oni kaptis lin kaj forkondukis en la rusan urbon Kaluga, kie li restadis ses jarojn. Unu jaron post la reveno li mortis.

El la fruktoj de lia multflanka streĉa agado la plej daŭra montriĝis la biblioteko. Jam en sia juna aĝo Zaŭski ekkolektis presaĵojn kaj manuskriptojn. Dum multaj vojaĝoj eksterlanden, dum vizitado de diversaj monaĥejoj enlande, li aĉetadis ĉion aĉeteblan, pruntis ĉion prunteblan. Li kolektis ne nur mem, sed pere de siaj agentoj, kiuj ĉiun akiraĵon tuj sendis al la biblioteko. Tiamaniere elkreskis libraro ampleksanta tricent mil volumojn, unu el la plej granda tiutempe en Eŭropo. Zaŭski certigis ĝian ekziston per speciala fondaĵo, lokigis en ampleksa ejo, la t.n. Daniłowicz-palaco. Sed tio ne sufiĉis al lia agema animo. Li ĉirkaŭis sin per eminentaj scienculoj, kaj ili kune klopodis savi la atingiĝojn de la nacia paseo minacatan far tiama politika situacio en Pollando, kaj krei bazon por scienca laboro. Zaŭski kontribuis al kreo de la pola bibliografio, al eldonado de la elstara serio Volumina legum, al eldonado de polaj sciencaj revuoj.

Post subjugigo de Pollando Bibliotheca Zalusiana, konfiskita, estis transportita al Peterburgo kaj aligita al Cara Biblioteko Pubblica. Parton sukcesis reakiri la pola registaro post kiam Pollando ree sendependiĝis en 1918.

Vere eksterordinara homo estis la florenca kolektanto Antonio Magliabecchi, vivinta inter la jaroj 1633–1714. Li apartenis ankoraŭ al tiuj kleruloj kies scio ampleksis ĉiujn branĉojn de la scienco. Tia polihistoro li fariĝis dank' al siaj mirinda memoro, nesatigebla sciavido kaj pasia kolektado kies frukto estis valorega, riĉa libraro.

Oni rakontas ke Magliabecchi neniam finlegis librojn, sed malgraŭ tio li tiel perfekte konis ilian enhavon ke neniu povis konkurenci kun li tiurilate. Preskaŭ dum sia tuta vivo li estis bibliotekisto de la arĥiduko Kosimo III, ĝuante ties favoron kaj apogon, kio plej verŝajne estis nepra kondiĉo de liaj

atingoj.

Ĉar Magliabecchi estis vizitata far diversaj en- kaj eksterlandaj eminentuloj, sciencistoj, verkistoj k.t.p., kiujn ligis unu sama interesiĝo, la bibliofilio, kaj kiuj ne volis eviti la raran okazon vidi la faman strangulon, ĉirkaŭ lia persono kreskis amaso da diversaj rakontoj, anekdotoj kaj onidiroj veraj, veretaj aŭ legendaj.

Sed lia nekutima vivo parte pravigis ilin. Magliabecchi vivis tute sola, ne nur sen edzino sed eĉ sen servistino aŭ servisto, nutradis sin ĉe najbaroj, dormadis nur tri-kvar horojn /inter libroj/ kaj ne zorgis pri pureco de sia loĝejo, la sola luksaĵo, kiun li ĝuis, estis la flartabako.

Unu el la vizitintoj, Henriko Bartsch, tre interese karakterizis lin en unu el siaj leteroj: "En Florenco sinjoro profesoro Schurzfleisch rekomendis min al la fama bibliotekisto Magliabecchi kiu akceptis nin bone kaj faris al mi kaj miaj kunuloj eksterordinarajn afablaĵojn. Tri tagojn li vagadis kun ni kaj montris ĉiujn rigardindaĵojn, precipe la arĥidukan bibliotekon. Fine li gvidis nin ankaŭ en sian propran bibliotekon; tie ĉio aspektis vere mirakle, kaj mineniam vidis nek vidos similan malordon. Tiu viro vivas tute sola. /.../ En lia domo troviĝas nenio krom seĝoj, sur kiuj kuŝas libroj, kaj unu matraco, sur kiu li dormas. En la vestiblo kuŝas libroj unuj sur la aliaj ĝis la plafono, tiel ke restas nur streta trairejo inter ili. Simile aspektis la aliaj ĉambroj. La ŝtuparon kovras libroj tiamaniere ke ofte oni devas ilin surtreti. /.../ La ŝrankoj estas trivice plenigitaj per libroj. En la korto troviĝas puto sur kies randoj ĉirkaŭe kuŝas libroj. Sed malgraŭ tio li povas tuj trovi la plej etan volumon. La monsumo, kiun li posedas, ne superas 20 skudojn, sed eĉ tio estas dismetita inter libroj. Almozulon, se tiu venas, li sidigas al la tablo kaj invitas preni ĉion troveblan.

Li dezirus posedi en sia domo duoble pli da libroj ol troviĝas en la arĥiduka biblioteko. Li ĝuas trean favoron de la arĥiduko kaj povus ricevi de li ĉiun bezonatan monsumon, sed li ne zorgas pri mono krom se tio servas por aĉeti librojn. Ni rimarkis ke la plej bona frandaĵo por li estas la flartabako, tial ĉiutage ni plenigis lian tabakujon, kiu baldaŭ malplenigis. Tiukaŭze li tial difektis sian kolosan nazon, ke ĝi aspektas kvazaŭ kamentubo."

Sed la supra priskibo, iome emfazanta la ridindajn ecojn de la fama bibliotekisto vere oscilanta inter bibliofilio kaj bibliomanio, donas ne tute veran bildon. Magliabecchi estis erudita servisto de la libro, kaj liaj kolektista peno, rezigno pri oportuna vivo kaj persista streĉa laboro kaŭzis, ke post kiam li mortis Florenco gajnis Bibliotheca Magliabecchiana, libraron de vasta famo kaj de mirinda valoro ampleksantan tridek mil volumojn. Poste pliriĉigata ĝi transiris en 1859 en la posedon de Biblioteca Nazionale.

6. XIXa jarcento

Inter hispanaj bibliofiloj de la deknaua jarcento ĝeneralan simpation gajnis Joakimo Gomez de la Cortina. Naskiĝinta en Meksikio en 1808 li ricevis perfektan edukon, finis en la universitato de Alcala la juran fakultaton, doktoriĝis, fariĝis en la sama universitato profesoro pri la kanonika juro, poste translokiĝis en Madridon kie li fariĝis rektoro kaj juĝisto ĉe la plej supera tribunalo. En 1847 oni honorigis lin per markizeco, en 1859 li fariĝis senatano.

Sed malgraŭ siaj altaj postenoj, malgraŭ la ĝenerala estimo ĉirkaŭanta lian personon Gomez restis homo simpla kaj modesta, same en la privata kiel en politika vivoj. Li trinkis nek kafon nek teon nek alkoholjaĵojn, ne fumis, ne flaris tabakon. Ununura lila pasio estis libroj. Kolekti ilin, studi kaj ordigi li komencis ankoraŭ dum sia studenta aĝo, kaj poste — havante grandajn enspezojn, ja 125 000 frankojn jare — li plejparton de sia gajnaĵo elspezis por libroj. Post kiam li mortis, oni konstatis ke la biblioteko, troviĝanta en tri speciale por tiu celo aranĝitaj ĉambregoj de lia palaco, enhavas pli ol 120000 volumojn, estis do unu el la plej grandaj privataj bibliotekoj en la deknaua jarcento. Laŭ valoro ĝi povus sukcese rivali kun la famaj bibliofilaj libraroj tiutempaj, sed aparte interesa estas la fakto ke multaj el tiuj verkoj estis protestantismaj, ateismaj aŭ herezaj. La markizo, malgraŭ ke modela katoliko, kolektis ilin fervore kaj — plej verŝajne — ankaŭ studis.

Li volonte restadis inter siaj libroj. Ne estis manio de bibliomano-strangulo, sed — kiel diras historiistoj — simptomo de la

eksterordinara instruitero, nesatigeble avida je plu scio. Senĝene vestita, en hojmaj pantofloj, li promenis inter la ŝrankoj, prenadis volumojn, jen legis ilin, jen trarigardis, ordigis k.t.p. kaj en tio li trovis plej grandan ĝuon. La libroj – kvazaŭ reciprokante dankeme la favoron – noble influis la mentalon de sia posedanto: li estis homo nobla, klera, tolerema kaj tial ĝenerale respektata kaj ŝatata.

7. La "amerika danĝero"

Dum la deknaŭa jarcento aperis nova faktoro, forte influanta la libromerkaton: la tiel nomata "amerika danĝero". La bibliofilo trovis multajn favorajn adeptojn inter la usonaj milionuloj kiuj dank' al sia mono kapablis, precipe en diversaj aŭkcioj, venki ĉiujn konkurantojn kaj elaĉeti ĉion belan kaj valoran, se nur estis tio aĉetebla. Tiamaniere multaj trezoraĵoj, ĝis tiam restintaj en posedo de eŭropaj privatuloj, translokiĝis al Usono.

Sed amerikaj kolektantoj ne estis etmensaj simpluloj kiuj aĉetas nur ĉar ili havas monon kaj emas brili per siaj libraroj. Ilia riĉeco kuniĝis harmonie kun edukiteco, kono pri la objektoj de la hobia, kaj konvinko ke la kolektata libraro devas servi – se ne tuj, jen pli poste – al la tuta popolo. Tial la plejmulto de la libraroj, kiujn kolektis la usonaj bibliofiloj, transiĝis en posedon de publikaj bibliotekoj, aŭ mem ŝanĝiĝis je tiaj.

Krom malnovaj manuskriptoj kaj presaĵoj eŭropaj, la ĉefa ĉasataĵo por usonaj kolektantoj estis malnovaj verkoj pritraktantaj la koloniigon de Ameriko kaj historion de la indianoj. Tiajn "amerikanaĵojn" estantajn nun ĉefa bazo ĉiuj studoj pri la historio de Usono, kolktadis precipe J.C.Brown, J.Lennox kaj W.L.Clements. La libroj de Lennox nun troviĝas en Publika Libraro en Novjorko, Brown donacis siajn librojn al la biblioteko de Brown–Universitato en Providence, kaj la vere unikan kolekton de Clements ricevis la universitata biblioteko en Michigan.

Sed la reĝo de la usonaj bibliofiloj oni opinias la inter 1837 kaj 1915 vivintan John Pierpont Morgan. Eminentia financisto, fondinto de J.P.

Morgan & Co. – unu el la plej grandaj usonaj bankoj, financinta minejojn, asociojn asekurajn navigajn kaj fervojajn, kontrolinta aliajn bankojn, li havis unu pasian hobion: kolekti librojn. Tiu nevenkebla emo kostis lin ĉirkaŭ dek milionojn da dolaroj. En Novjorko li konstruigis marmoran palacon por sia biblioteko, kiu – laŭ asertoj de spertuloj – enhavis esencon de famaj bibliofilaj bibliotekoj el la du lastaj jarmiloj.

Li fidis ne nur al sia propra kono, sed ĉirkaŭis sin per ekspertoj kiuj serĉis por li, helpis elekti kaj prilaboris planojn pri pligrandigado de la biblioteko. Morgan havis eksterordinaran instinkton de komercisto kaj, malgraŭ ke li fojfoje pagis fantaziajn sumojn, li preskaŭ neniam tropagis.

Li aĉetis, ekzemple, plimulton de la koptaj, el la IX–X jarĉ. devenantaj manuskriptoj, kiujn araboj trovis en 1910 ĉe Fajum kaj anoncis por vendo. Okazadis de bibliofilaj unikaĵoj, kiuj longege restadis posedaĵo de malnovaj eŭropaj familioj, ektroviĝis en la Morgan–biblioteko, dum la preskaŭ ĝenerala opinio eĉ ne supozis tion. Lia kolekto estis ne tiom granda kiom valora. Multegaj el liaj 20 mil presitaj libroj havis mirindajn, historie valorajn bindaĵojn, kaj ankaŭ la 1300 manuskriptoj grandparte estis mezepokaj ornamitaj volumoj.

Ankaŭ tiu biblioteko, konstante pligrandigata (en 1924 oni faris ĝin J.P.Morgan–Fondaĵo), estas nun publika posedaĵo kaj servas al la tuta nacio.

Krom la jam menciitaj bibliofiloj aktivis en Usono multaj aliaj. Kolekto de H.E.Huntington, ampleksanta ĉirkaŭ 300 mil volumojn (inkluzive kvin mil inkunablojn, multjn milojn da mapoj, manuskriptoj, leteroj k.s.) estis far li aranĝita en palaceska konstruaĵo de lia granda bieno en San Marino ĉe Los Angeles. Huntington, pasia kolektanto kaj sperta konanto de libroj, disponanta pri grandaj financaj rimedoj, ne hezitis aĉeti, se ne eblis aliel, eĉ tutajn privatajn kolektojn, por elekti poste el inter ili nur unuopajn pecojn. Hodiaŭ lia libraro estas propraĵo de la ŝtato Kalifornio.

Alian sorton trovis la libraro de R.Hoe. Jam kiel knabo li komencis kolekti kaj tiu pasio ne forlasis lin ĝis la morto. La atingita granda riĉaĵo (li fariĝis produktisto de presiloj) ebligis kolekti jam grandskale. Sed Hoe iom

diferencis disde aliaj bibliofiloj. Li ne zorgis por famigi sian nomon per sociaj bonfaroj, ne testamentis do al la nacio. Lia libraro – laŭ la lasta volo de l' posedanto – estis aŭkciata kaj donis preskaŭ 150 milionojn da frankoj. Hoe asertis ke valoraj libroj ne restadu en grandaj librejoj, ĉar tie ili kuŝas neglektate kaj granparte forgesite; prefere oni permesu kaj ebligu, ke tiaj volumoj transiru en posedon de aliaj libroamikoj komprenantaj ilian valoron kaj scipovantaj zorgi inde pri ili.

Lia rilato al la libro estis pure bibliofila, li ĝuis ties apudecon, esploris la kovrilojn, la ornamaĵojn, kaj antaŭ ĉio legis diligente. Hoe estis fondinto de Grolier-Club en Novjorko kaj inspirinto je aparte usona kovrilarto. Li kolektis ne nur multekostajn malnovajn raraĵojn, sed ankaŭ novajn volumojn kies merkata valoro ne estis granda sed kiuj konformis al lia bibliofila gusto. La libro, li opiniis, estu valora ĉiuflanke: laŭ enhavo, papero, preslitoj, ilustraĵoj, kovrilo k.t.p., do kiel konglomeraĵo de diversaj faktoroj. Tia opinio kaj la el ĝi fontanta devosento gardi la librojn kiel artaĵo estis kaŭzo de plejzorgema traktado de libroj en tiu biblioteko. Koncerne tion la biblioteko estis imitinde modelo.

8. Specialaj aspektoj de bibliofilio

Interesan kaj unikan ekzemplon de bibliofilio priskribas la pola popola verkisto J. Wantuła. "Jen", li rakontas, "en la tempo kiam sur ceteraj polaj terenoj estis malmulte da kamparanoj scipovantaj legi, kiam ofte eĉ nobelo subskribadis, kiel analfabetoj faras, per tri krucetoj, en Silezio unu kamparano per sia propra, pene perlaborita mono aĉetadis librojn kaj eĉ provizis ilin je sia propra ekslibriso. Estis Jura Gajdzica el Cisovnica, malgranda vilaĝo en suda Pollando. Principan legoscion li akiris hejme. Poste, laŭ tiama kutimo, li kelkajn jaron dum vintraj monatoj frekventis unuklasan lernejon protestantan /.../ Por plua lernado mankis eblecoj /.../ Li devis prepariĝi al veturigista profesio, kaj mastrumadi ne nur sur propra tero, sed ankaŭ "sur la sinjora" (ja estis tempo de servuteco). Pro sia denaska inklino al libroj li aĉetadis en proksima urbo ĉion riceveblan, grandparte

librojn religiajn kaj historiajn, kaj sorbis la scion dum vesperoj kaj festotagoj. Post kelkaj jaroj kolektiĝis tiamaniere plena kestego da libroj. En tiujn librojn Gajdzica engulis sian ekslibrison /.../ Gajdzica aĉetadis librojn broŝuritajn kaj poste mem bindis ilin. Li havis multajn infanojn. Kiam ili plenkreskis kaj estis dotataj, ĉiu ricevis aldone kelkajn librojn."

Gajdzica eĉ verkis memorlibron *Dło pamięci rodu ludzkiego* (Por memoro al la homa gento); la memorlibro – post kiam cent jarojn pli poste publikigis ĝin Wantuła [la agadon de J. Wantuła inkluzive sur tereno de la bibliofilio priskribas K. Szczurek en la libro *Homoj, verkoj, ideoj*, Cieszin, 1990] – vekis tiel grandan interesiĝon, akiris tiel favoran pritakson, ke la varsovia Societo De Amikoj De L'Ekslibriso eldonis ĝin bibliofile en nur cent ekzempleroj ornamitan per ksilografiaĵoj de Ostoja-Chrostowski, eminenta grafikisto, profesoro kaj rektoro de la varsovia Akademio De Belartoj.

El amaso de nomoj ni elektis kelkajn tiel ke ili reprezentu diversajn tempojn, lokojn kaj mediojn. Apud la cititajn ni povus loki aliajn nomojn, ne malpli honorindajn: jen, ekzemple, Tomaso Phillips en la deknaŭa jarcento dum siaj multaj vojaĝoj kolektis ĉirkaŭ 60 mil manuskriptojn kaj fariĝis la plej granda kolektanto de tiaj libroj. Bedaŭrinde, lian kolekton poste dissemis kelkaj aŭkcioj. Dua simila grandulo estis lordo Spencer.

Freiherr von Meusebach, eminenta germanisto, prezidanto de Kassationshof en Berlino, kolektis brilan bibliotekon riĉan precipe je germana literaturo el la jardekoj XVI–XVII. Tiu kolekto post morto de Meusebach transiris peraĉete en la reĝan bibliotekon en Berlino.

La sama biblioteko aĉetis libron restintan post Ludoviko Bledow. Tiu fama ŝakisto, instruisto pri matematiko en Köllnische Realgynasium en Berlino, fondinto de la berlina ŝakista skolo kaj de ŝakrevuo, kolektis abundan, brilan fakan bibliotekon pri la ŝakludo.

Eminentaj bibliofiloj estis la franca reĝo Francisko I, la germanaj Maksimiliano I kaj Karlo V, la florencaj princoj de Medici, la germanaj baronoj Rotschild, la polaj magnatoj Zaŭski kaj Ossolinski, la samlanda instruisto Wolski, la verkistoj Boccaccio, France, de Amicis, Rolland, Tuwim, de Pixérécourt, kaj precipe Ch. Brunet kaj G. Naudé, du eminentaj

gvidantoj tra la lando de la bibliofilio. *Advis pour dresser une bibliothèque* de Naude kaj *Manual du librairie* de Brunet apartenas al fundamentaj verkoj pri la libro.

La bibliofilio, en kies ĝisnuna historio alternis periodoj de prospero kaj florado kun periodoj de neglekto kaj forgeso, travivis diversajn modojn kaj tendencojn. Cetere, tiuj modoj kaj diversaj rilatoj al la libro diferencigas ne nur tempojn sed ankaŭ unuopulojn. Unuj kolektas, ekzemple, skribaĵojn kiel eble plej malnovajn, aliaj pri unu historia periodo aŭ evento, aliaj pri iu regiono aŭ loko, aliaj nur kun koloraj ilustraĵoj.

Por iuj estas grava nur la materialo sur kiu oni presis, ili kolektas, ekzemple, nur librojn presitajn sur pergamento, silko, asbesto k.t.p., por aliaj pri valoro de libro decidas ties eksterordinara enhavo: personaj satiroj, strangaj disertaĵoj, historie famaj deklaroj k.t.p..

Tiel, diversaj elementoj de la libro povas vekti interesigon kaj esti kaŭzo de l' kolektado. Ni provu ilustriti tion per iom da ekzemploj.

En la antikva tempo kaj en la mezepoko ne estis videblaj specialaj plaĉoj. La eŭropa renesanco ekpreferis precipe la antikvajn klasikulojn kaj la doktorojn de l' eklezio, sed tiam oni turnis atenton al la eksteron de la libro, al la arta bindaĵo, kiu sian apogeon trovis en la renesancaj bindaĵoj de Aldo Manutio, precipe en tiuj faritaj por Johano Grolier. Ankoraŭ nun oni aprezas tiujn bindaĵojn kiel supron de la bindarto.

En la dekoka kaj deknaŭa jarcentoj avide serĉataj fariĝis la presaĵoj de Elzeviroj. La prapatro de tiu fama presista familio, Ludoviko, estis en la dekseka jarcento pedelo en la universitato en Leiden, sed post kiam ili ricevis permeson vendadi librojn, li tiel bone aranĝis kaj evoluigis sian komercon, ke baldaŭ ne nur Nederlando sed eĉ vasta eksterlando aĉetis de li. Cetere, Elzeviroj havis filiojn ankaŭ en aliaj urboj, ekz. en Amsterdamo kaj Frankfurto.

Post kiam kreskis la famo de la firmao la elzeviraj presaĵoj fariĝis tiel avide ĉasataj, ke inter bibliofiloj oni diris pri "elzevira manio". La kolektantoj pagis fojfoje fantaziajn sumojn, eĉ por ekzempleroj ne speciale raraj, kaj por mezuri la margenojn de elzeviraĵoj, kiuj estu kiel eble malplej

ĉirkaŭtranĉitaj, oni kreis specialan mezurilon. Unu el la plej grandaj kaj valoraj kolektoj de elzeviraj presaĵoj estas la Berghman-kolekto de Reĝa Biblioteko en Stokholmo.

En la deknaŭa jarcento aktivis verkiste en Francio la fratoj Goncourt, fondintoj de samnoma fondaĵo kies celo estis premii la plej valorajn atingojn literaturajn. Ili akiris ankaŭ grandajn meritojn sur la kampo de bibliofilio. La fratoj Goncourt, perantoj inter la ĝistiamaj kaj la nova generacio de libroamiko, nove ekrilatis al la libro. Ne skribo aŭ preso, ne rara aŭ altvalora bindaĵo interesis ilin. Por ili libro estis relikvo, konkreta explorebla restaĵo post la pasintaj jaroj, jarcentoj, eĉ jarmiloj, surbaze de kiu eblis ekkoni la paseon, konkludi pri ĝi kaj ĝin priskribi.

La fratoj Goncourt kolektis luksajn, multekostajn volumojn, kaj simplajn popularaĵojn, se tiujn lastajn ili bezonis, grafikaĵojn de plej eminentaj majstroj, kaj misvalorajn produktaĵojn amatorajn; ĉar ĉio estis por ili bezona por la konkreta celo: studado kaj priskribado de la arto, moroj, kutimoj k.t.p. de la dekoka jarcenta Francio. Al ĉiu ero de sia kolekto, sendepende de ĝia valoro, ili rilatis zorgeme kaj pietisme, ja ĉiu iel parolis pri la pasinta tempo. Kaj tia rilato influis kaj baldaŭ ekregis la eŭropan bibliofilion.

En la dua duono de la XIX-a jarcento bibliofiloj komencis ĝeneralan ĉasadon je la dramoj de William Shakespeare aperintaj en la kvar konataj eldonoj "in folio" - 1623, 1632, 1664, 1685. Oni pagis grandajn sumojn, fojfoje multajn centojn da pundoj por tiuj volumoj, kies prezoj en aŭkcioj antaŭ cent jaroj egalas al kelkaj pundoj. Tia ĉasado ankoraŭ nun daŭras inter usonaj kolektantoj, el kiuj Clay Folger sukcesis kolekti la plej grandan aron de ŝekspiraĵoj: 40 mil volumojn de Shakespeare kaj pri Shakespeare, inter ili 79 ekzemplerojn de la "the first folio".

Sed la rapide kreskanta bezono je libroj kaj la el ĝi sekvanta rapida presado, pli kaj pli mekanizata, baldaŭ alportis negativajn sekvojn: sinkis la arta nivelo de la libro. Oni produktis malpli bonan paperon, presis neglekte, bindis same, la ilustradon oni komisiis al meztalentaj, se nur ne tre kostaj artistoj.

Kontraŭ tiuj simptomoj de degenerado de la presista arto ekbatalis en la fino de la deknaŭa jarcento grupo de anglaj artistoj kaj verkistoj nomata "prerafaelitoj", deklaranta ke la libro fariĝis degenerinta, spirite senviva produkto de maŝino, kaj strebanta revivigi ĝin kiel artaĵon. La libron oni devas savi el jugo de la maŝino, plinoblighi ĝin teknike, estetike kaj etike, fari ĝin ree tutaĵo unueca, konsistanta el nobla enhavo kaj artnivela vesto. Ekzemploj estu libroj naskiĝintaj en la mezepokaj metiejoj, al ili oni revenu por serĉi instruon kaj guston.

Unu el la prerafaelitoj, verkisto, arĥitekto kaj pentristo William Morris, estris presadon en la bona londona Chiswick Press, kaj poste, en 1891, li aranĝis propran presejon en sia bieno Kelmscott Manor. El ĝi eliradis libroj plej bonkvalitaj (entute aperis 50) en malgranda eldonkvanto kaj tial tre serĉataj far kolektantoj. La agado de la prerafaelitoj kaŭzis, ke en tiutempa bibliofilio denove ekregis modo ŝati librojn, kies valora enhavo ricevis konvene brilan veston. Kvankam novaj tempoj alportis novajn gustojn estas fakto senduba, ke la prerafaelitoj kaj precipe Morris grave kontribuis por renesanco de arte valora libro.

Kiel konate, la kartuzianoj havas siajn monaĥejojn dissematajn en diversaj landoj, eĉ mondpartoj. Al la tieaj monaĥoj la fratoj en Meville presis librojn por preĝeja uzado. Tiuj libroj, presitaj per ruĝa aŭ blua tinkturo sur plej bona, mane produktita papero kun akva signo de la ordeno kaj provizitaj je ornamaj inicialoj, estas tre avidataj, des pli ke la monaĥoj fandis mem la tipojn, bindis la volumojn, ĉizis matricojn por la ksilografiaĵoj k.t.p., tiel ke la volumo estis tute nur ilia produktaĵo. Sed kiel akiri tian libron, se ili ne estas aĉeteblaj, sed distribuataj nur al la kartezianoj? Kaj tamen, malgraŭ la rareco kaj la neaĉetebleco, bibliofiloj tie-ie sukcesis akiri ekzempleron.

Alia kazo estas tiu de Bernard de Bluet d'Arbares en Parizo. Tiu homo aperigis verkon *Intitulation et Recueil de toutes mes oeuvres*, en kiu li prezentas sin mem homo scianta nek legi, nek skribi. Kaj li skribis ja kvar

volumojn! Por kolektantoj ne gravas, ke la enhavo estas tute senvalora, sufiĉas ke ĝi estas rara. Ili serĉas ĝin avide, kvankam preskaŭ ne eblas trovi sendifektan ekzempleron.

Bledow, kiun ni jam menciis, kolektis verkojn pri la ŝakludo, Meusebach pri germana literaturo el la dekseka kaj la deksepa jarcentoj, Phillips pri manuskriptoj. La eminenta pola poeto Julian Tuwim kolektis librojn kun kiel eble plej stranga enhavo: pri sorĉoj kaj sorĉistinoj, "droniguloj", diabloj, drinkuloj k.s. El tiuj kuriozaĵoj naskiĝis, aparte de liaj poeziaĵoj, kelkaj raraj verkoj de la poeto, ekz. *Polaj diabloj kaj sorĉoj*, *Pegazo baŭme*, *Pola drinkula vortaro kaj bakheca antologio*.

Tamen, la plej abundajn fruktojn donis la klopodado de tiuj bibliofiloj kiuj ne stretigis sian interesiĝon je unu temo aŭ libroelemento, sed kiuj ŝatis libron pro ties ĝenerala valoro, libron kiel — se licas diri tiel — fenomenon. Tiaj libroamiko ne supertaksis unu faktoron kompare kun la ceteraj, ne trogravigis la difektojn de siaj volumoj, etajn mankojn, makuletojn k.s., por ili ĉiu libro, se nur en stato de uzebleco, indus esti konservata laŭ la devizo, ke ĉiu leganto trovu sian libron kaj ĉiu libro sian leganton. El la peno de tiaj kolektantoj elkreskis grandaj bibliotekoj, kiuj poste, plej ofte, fariĝis nacia posedaĵo kaj servas al la sinsekvaj generacioj. Kiel ekzemplo povas servi la jam menciita J.A.Zaluski. Komence li pruntadis la librojn el la 400—mila kolekto, kaj poste entute donacis ĝin al la nacio.

9. Bibliofilaj asocioj

Se homo ne povas atingi ion unuope, li ligiĝas kun aliuloj havantaj samajn interesiĝojn kaj celojn, fondas komitatojn, klubojn, organizaĵojn, kaj strebas atingi kolektive tion, kion li solece atingi ne povus. Tiu ĉi principo validas ankaŭ en la bibliofilio, kaj jen la fonto el kiu aperis bibliofilaj asocioj. Ili tre diversis: unuj konsistis el kelkaj, dekelkaj aŭ kelkdekaj anoj, aliaj akceptis ĉiun volantan aniĝi, unuj estis ekskluzivaj, ekz. aristokrataj, en aliaj aniĝis reprezentantoj de ĉiuj klasoj kaj profesioj. Unuj ne limigis sian agadon, aliaj koncentriĝis je nur elektitaj sciencofakoj aŭ temoj kiel ekz. la historio, la

geneologio, la lingvistiko, elektita provinco aŭ lando, iu grava historia avento k.s. Sed ĉiujn ligis simila celo: kolekti librojn kaj zorgi pri ili.

En 1813, ekzemple, en la Londona St.Albans-Tavern kunvenis dudek viroj, kiuj sub prezido de Earl Spencer fondis Roxburghe-Club, la unuan anglan bibliofilan klubon, baptitan laŭ la fama princo-kolektanto. Oni decidis limigi la nombron de la anoj je tridek unu, sed pli poste ĝi kreskis ĝis kvardek. Ĉiujare unu el la klubanoj, laŭvice, devis je propra kosto eldoni unu raran libron kaj disdoni po unu ekzemplero al ĉiu cetera ano; tiel la klubo eldonis vicon da valoraj libroj, kiuj neniam venis en vendjon, ja estante neaĉeteblaj, kaj la eldonkvanto neniam superis sesdek ekzemplerojn. La kvardeko apartenis al la plej altaj tavoloj de la angla societo, ne mirinde do ke en la klubo oni same zorgis pri la libroj kiel pri plezuroj de l' palato kaj ke la kunsidoj plene harmoniis kun allogaj frandaĵoj.

En 1568, terura jaro de la skota historio, troviĝis homo, kiu per tuta sia forto strebis por savi el la religia -politika tempesto kiel eble plej multe el la skota literatura atingaĵo. Per kaŝado kaj kopiado li malhelpis, ke multaj trezoraĵoj malaperu por ĉiam. Laŭ lia nomo oni baptis Bannantyne-Club, kiun fondis en 1822 Walter Scott kaj kies tasko estis represado kaj reeldonado de tiuj preskaŭ malaperintaj verkoj por reakiri ilin al la skota kulturo. Sur tiu kampo la klubo atingis vere grandan meriton.

Proksimume en la sama tempo fondiĝis la unua franca bibliofila societo. O. Mühlbrecht en sia verko pri la franca bibliofilio rakontas ke "/.../ la unuan de januaro 1820 ok konataj libroamikoj, la markizo de Chateaugiron, de Pixérécourt, la barono Walkenauer, de Malartie, Durand de Lançon, Berard, la vicgrafo de Morel de Vinde, la grafo Eduard de Chabrol fondis *Société des Bibliophiles Français*. La animo de tiu unua franca societo de libroamikoj dekomence fariĝis René Charles Guilbert de Pixérécourt, ŝekspiro de antaŭurbaj scenejoj, ŝatata teatraĵisto kaj teatrogvidanto. Ĉe la fondiĝo kaj dum la unua jarcentkvarono la societo ne tre influis la bibliofilion en Parizo, nur post kiam la gvidadon transprenis la barono Pichon, ĝi - kiel societo de ĉefaj parizaj kolektantoj - akiris influan rangon. Pichon, akceptita en 1843 kiel membro, en 1844 estis elektita prezidanto, plenumadis tiun

funkcion ĝis 1894, kaj poste, ĝis la morto, estis honora prezidanto. La kresko, la florado kaj atingoj de la societo rezultis ĉefe el lia gvidado.

Ekde 1895 ekzistas en Parizo la asocio Les Cents Bibliophiles, al kiu povas aparteni ne pli ol 100 anoj; ĝi eldonas siajn eldonaĵojn en nur 101 ekzempleroj; unu restas en la arĥivo, la ceterajn ricevas po unu la anoj.

Tre displitita estis la germana bibliofila movado, kie agis multaj asocioj en diversaj urboj. Al la vaste konataj apartenis i.a. la en 1899 fondita Weimarer Gesellschaft der Bibliophilen kun propra revuo "Zeitschrift für Bücherfreunde" Maximilian-Gesellschaft, Gesellschaft der Bücherfreunde zu Hamburg kun la revuo "Imprimatur", kaj Gesellschaft der Bibliophilen en Munkeno.

"Ekscelenco! Respektindaj kaj tre Estimataj Kunvenintoj! Plej honorinda Folianto! La kapitulo de la Ordeno De Blanka Korvo decidis, ke via amo al libroj estu honorata je la jardeko de nia ekzisto. Kanceliero, tralegu la diplomon skribitan je la nomo de Lia Paĝeco la plej honorinda Episkopa Moŝto Stanisław Wojciech *in folio* Okoniewski! La kanceliero tralegis la diplomon kaj poste oni ĉirkaŭzonis la plej honorindan Folianton /.../ per zono kun lukse broditaj simboloj de la scio kaj amo al la libro, t.e. inkunabloj kun cizeloj en formo de blankaj korvoj broditaj per arĝento."

Tiel interalie skribis la bibliofila revuo "Silva rerum" (1939, nr. 3) pri la solenaĵo okazinta la 11-XII-1938 en Pollando. La solenaĵo kun siaj supozeblaj akcesoraĵoj certe estis interesa, sed ĝi ne instigu nin je misaj konkludoj: polaj bibliofilaj organizaĵoj ne limigadis sian agadon je nur bankedoj. Kolektado, eldonado de raraj libroj, zorgado pri arte alta nivelo de la libro, instigado je serĉo de novaj vojoj en la presarto, esplorado de la librohistorio - jen kelkaj partoj de tiu vasta kampo, kiun kulturis la tieaj libroamikoj. El kelkaj organizaĵoj la plej altnivela estis la krakova Towarzystwo Miłośników Książki eldonanta la revuojn "Ex libris" kaj "Silva rerum".

En Belgio bibliofilaj societoj agis en Bruselo kaj Mons, la ĉefaj libroamikoj societiĝis en 1908 je Spolek českých bibliofilu (en 1910 ekaperadis "Česky Bibliofil"/, en Aŭstrio la Viena Bibliofila Societo fondiĝis en 1912 kaj

eldonadis "Mitteilungen", en Svedio apud bibliofilaj organizaĵoj fondiĝis societo por represado de malnovaj libroj.

Je fino de nia rakonto pri la bibliofilio ni diru resume, por ke kolektado de libroj donu valorajn fruktojn, ĝi baziĝu sur raciaj principoj. Nur tiam kolektanto ne ŝanĝiĝos je primokata strangulo kaj lia kolekto je kaosa amaso da makulaturto, en kiu tie—ie troveblas valora peco.

Por la kulturo la racia bibliofilio havas valoron ekstreman. La ŝirmemaj manoj de libroamikoj savis el pereco multajn verkojn de plej alta valoro. Dank' al klopodoj kaj mona apogo de bibliofiloj aperis multaj libroj, kiujn eldoni ne riskis eldonejoj kaj ne povis la aŭtoroj. Bibliofiloj zorgis kaj batalis pri arte alta nivelo de la libroj. Ili esploris la historion de la libro, edukis la legantojn ne kontentiĝi per ia ajn presajaĉo, montradis imitindajn ekzemplojn de amo al libroj. Plejmulto de nuntempaj grandaj libraroj elkreskis el privataj kolektoj — fruktoj de unuopula peno. Inter fondintoj kaj apogantoj de bibliotekoj plej multaj estis bibliofiloj; ili iniciatis diversajn agadojn kiel ekz. ekspoziciojn, konkursojn, kunvenojn, internacian kunlaboron, aŭkciojn k.s. Rezultoj de tiu bibliofila strebado restas videblaj en la kulturo de ĉiuj civilizitaj nacioj.

Adreso de la aŭtoro:
Szcurek, Kazimierz
str. Przepilinskiego 28
PL 43-400 Cieszyn
POLLANDO

Elektita bibliografio

- Augusta J. M. : Rukovět sběratelova, Prag, 1927
 Bankowski P. : Załuski i jego dzieło
 Besso M. : Il Philobiblon di R. de Burry, Roma, 1914
 Bogeng G. a. E. : Die grossen Bibliophilen, Geschichte der Büchersammler und ihrer Sammlungen, Leipzig, 1922
 Burry R. de : Philobiblon
 Cannon C. L. : American Book Collectors and Collecting from Colonial Times to the Present, New York, 1941
 Debicki Z. : Kasproicz — poeta bibliophil, Warszawa, 1926
 Demby S. : O miłości do ksiąg w Polsce, Warszawa, 1926
 Dolensky A. : Stari čeští sběratelé knih. Knizni kulturna doby staré a nové, Praha, 1926
 Elton Ch. J. : The Great Book Collectors, London, 1893
 Fletcher W. Y. : English Book Collectors
 Grohmann A. : Bibliotheken und Bibliophilen im islamischen Orient, Festschrift zum 200-jährigen Jubiläum des Gebäudes der Nationalbibliothek in Wien, Wien, 1926
 Growoll A. : American book clubs, ?, 1897
 Haebler K. : Deutsche Bibliophilen des XVI Jahrhunderts, Die Fürsten von Anhalt, ihre Bücher und ihre Bucheinbände, Leipzig, 1923
 Opałek M. : Echa bibliofilstwa w poezji, Lwow, 1934
 Ribera y Terrago : Bibliofilos y Bibliotecas en la Espana musulmana, Saragossa, 1896, dua eld. 1928
 Ricci S. de : English Collectors of Books and Manuscripts — 1530 — 1930, Cambridge, 1930
 Stochel St. : Książ jestem niesyty, Krakow, 1957
 Volf J. : O starych českých sběratelích knih, Praha, 1937